

Instru-cirkulero nov. 2005
Informilo por E-instruantoj, instruistoj, interesitoj pri E-instruado

Saluton,

vi ricevas tiun cxi informilon, cxar via nomo iel ligigxas al E-instruado en Germanio, kaj estas deziro scii: kiom da aktivaj aux malpli aktivaj gekolegoj (cxu profesiaj instruistoj cxu instruantoj) troveblas en Germanio, kiu kion faras por la instruado de E-o, kiu kie instruas, kiujn materialojn uzas, kiujn spertojn havas, cxu bezonas helpon, helpilojn?

La celo povus esti pli bona kunlaboro inter tiuj gekolegoj, spertintersxangxo, pli bona informado pri planoj, sukcesoj, internaciaj subvencioj, komunaj projektoj, ktp.

Komencigxis pasoj por reaktivigi AGEI (Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj) kaj la landan sektion de ILEI. Saluton al cxiuj malnovaj membroj, kaj bonvenon al cxiuj novaj!

GRAVE: per simpla plenigo de enketilo vi povas doni la deziratajn informojn pri viaj kapabloj, spertoj, instruagado, kurso. Estas jam uzebla la reta versio de la ENKETILO-REGISTRILO cxe <http://instrureg.laarts.info>, kaj mi petas, ke ankaux vi plenu gxin kaj bonvolu informi ankaux aliajn gekolegojn en via cxiurkauxajxo, regiono pri tiu projekto. Koran dankon pro via rapida reago, resendo de informoj. (Dankon al tiuj gekolegoj, kiuj jam resendis gxin.) Estas granda helpo por estonta kunlaboro, kunordigo de farendajxoj kaj fareblajxoj por E-instruado en Germanio.

Kaj jen kelkaj fresxaj informoj:

PEDAGOGIAJ TAGOJ: Ni kore dankas al cxiuj prelegintoj, kontribuintoj pro la farita laboro kaj esperas, ke cxiu partopreninto trovis interesajxojn dum la cxi-jara fakkunveno.

Kelkajn fotojn kaj la artikolon, kiu aperis pri tiu evento en la regiona gazeto Harz Kurier, vi povas vidi cxe: <https://fotoalbum.web.de/gast/korody/pedtagokt05>

Pedagogiaj Tagoj 2006: 30.09-03.10 en Herzberg am Harz. Cxeftemo: instrumaterialoj, instruhelpiloj (kiu libro por kiu celo, nivelo; prezenteblo por propraj materialoj, helpiloj; metiejo por verki tauxgajn ekzercojn). Invitita prelegonto, konsilonto: Stefan MacGill, vicprezidanto de ILEI, auxtoro de pluraj lernolibroj, kunlaboranto de Manlibro por E-instruado.

INTENSAJ LINGVOKURSOJ en la klerigejo de GEA: (Germana Esperanto-Centro, Herzberg) de komencanta nivelo gxis perfektigxo. Sekva dato: 3-9 decembro 2005. (Por kursofertoj en 2006 bv. viziti la retpagxon: www.esperanto-zentrum.de GEA-Centro, Lingvokursoj).

Speciala oferto: preparkurso antaux GEI kaj ILEI-ekzamenoj.

EKZAMENOJ: Gratulojn al la 2 ekzamenitoj de GEI B, kaj 8 ekzamenitoj de GEI C ekzamenoj, kiuj trapasis ekzamenon en oktobro 2005 dum la Pedagogiaj Tagoj!
ILEI ekzamenoj en printempo: dum PSI (10-17 aprilo, 2006).

STUDSESIOJ: se vi volas perfektigi viajn lingvoscion, auxdi, lerni pli multon pri E-gramatiko, literaturo, historio, kulturo, eble poste farigxi E-instruanto, bonvenon al la serio de studsesioj en Herzberg am Harz! Sekva studsesio: 8-11 decembro 2005. Temoj: E-historio, literaturo, gastprelegonto: Dr. phil. Rudolf Fischer pri interlingviko, specifaj temoj el la E-gramatiko.

ALVOKOJ:

1. Por universitataj gestudentoj venis oferto el Cxehxio por dusemajna somera kurso en lingvotendaro. La duono de la kostoj estos repagebla per subvencio de cxehxa-germana fonduso. Se vi interesigxas, bv. tuj informi min!

2. Instruiston en Uzbekistano multe interesas E-instruado en Germanio kaj sxatus kontakti gekolegojn por intersxangxi la spertojn.

Eugeno S.P. retadreso: Esperuzo@mail.ru

Esperanto-Centro, abon. jashik 140, Poc^tamt,
UZB-700000 Tas^kento, UZBEKISTANO, CIS

3. Konkurso de infan-desegnajxoj

Esperanto en Vendomois, Les Monts FR 41330 Lunay

esperantoenvendomois@club-internet.fr

Konkursaj reguloj: Jara temo: El tiuj kvar elementoj, kiu(j) inspiras vin : AKVO FAJRO
TERO AERO

Formato: Centimetraj dimensioj , minimume 40x30

Kategorioj A : gxis 7 jara, B : pli ol 7 gxis 10 jara, C: pli ol 10 gxis 14 jara

Limdato 25a de majo 2006

Dorse de la desegnajxo notu, esperantlingve, nomon, agxon de la infano, adreson de la lernejo au' de la E-klubo, kaj koncizan priskribon de la "verko". Premioj estos atribuitaj po 3 en cxiu kategorio. Cxiu infano ricevos partoprenan diplomon. Libroj, kasedoj, KD, T-cxemizoj konsistigos la premiojn.

Sebeto (Sébastien Merlet) maxmanseb2713@yahoo.fr Tel. : 06-77-37-49-88

Vic-prezidanto de JEFO, Sekretario de Esperanto-Loiret, Trésorier du groupe GENEPI d'Orléans

<http://www.esperantomondo.net>, <http://esperanto.loiret.free.fr>, <http://sebeto.esperanto-jeunes.org>, <http://esperanto-jeunes.org>

Mi klopodas regule dissendi aktualajn fakajn informojn, gravajn novajxojn al cxiu(j), kiuj iel rilatas al, agadas por E-instruado. Se ankaux vi havas informojn rilate al E-instruado, bv. sendi al mi por diskonatigo. (Se vi ne plu volas ricevi miajn cirkulerojn, bv. informi min.)

Bonvolu ne forgesi plenigi kaj sendi la enketilon-registrilon <http://instrureg.laarts.info>! (Al tiuj, kiuj ne havas ret-aliron, mi volonte sendos posxte.)

Kun multaj salutoj:

Zsofia Korody

GEA-komisiito por instruado